



Boletín

n° 426 Aprilo - Junio 2019



Asociación de utilidad pública

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 426

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun per-
meso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):

admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: José Antonio del Barrio

Vicprezidanto: Ángel Arquillos López

Sekretario: Águeda Biurrun

Kasisto: Jesús M. García Iturrioz

Voĉdonantoj: Eduardo Berdor

“ Alberto Granados

Prezidanto HEJS: William Guerrero

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

Salutvortoj

Post la Triopa kongreso, kelkaj georga-
nizantoj restis tre lacaj, tamen feliĉaj kaj
optimismaj, ĉar ĉio disvolviĝis sukcese
kaj la ĉeestintoj kaj partoprenintoj ne
forgesos la eventon dum multe da tem-
po. Pri tio mi tute certas, ĉar amaso da
mesaĝoj alvenis en nian leterkeŝton dan-
kante la komfortan loĝejon, bongustan
manĝon, organizadon, programerojn kaj
bonan estoson sub la blua ĉielo, kiu ka-
rakterizas la paradizan urbon Malago.
En ĉi numero vi havas la eblecon reme-
mori kelkajn momentojn sur paĝoj 7, 8,
9 kaj raporteton pri la UK, paĝo 10, 11,
inter aliaj artikoloj pri diversaj temoj al-
venintaj al nia redakto pri SAT-
Kongreso, okazonta en Barcelono, ktp.

Santanderanoj jam planas organizi en la
monato majo, 2020, (paĝo 2), la venon-
tan HEF kongreson, ŝajne, sed ankoraŭ
ne decidite, en Comillas, kiu estas bele-
ga kaj alloga loko por la nacia evento, ŝi
staras tre proksime de la ĉefurbo. Mi
gratulas la novan LKK, ĉar mi certas ke
ili imitos la plej bonajn okazaĵojn kaj
sendube sukcesos.

En Julio okazos la UK en la bela urbo
Lahtio, ĉe Finnlando, (paĝoj, 10, 11), kie
oni elektos novajn estraranojn, inter ili la
novan Prezidanton. Mi deziras ĉion bon-
nan al li, ĉar estas grava laboro estri
UEA-an.

Ĝuu la legadon kaj ne forgesus venont-
foje kontribui per interesaj tekstoj, ne
gravas la temo, gravas ke ili estu verkitaj
en Esperanto.

Ángel Arquillos

ENHAVO

Salutvortoj	1
Protokolo Ĝenerala Ordinara Kunveno	3
Subvencio por partopreni la IJK	5
Sanĝo de estraro	6
Raporto pri la Triopa Kongreso de Esperanto 2019	7
104-a Universala Kongreso (Lahtio) 2019	10
Survoje al la 92-a SAT-Kongreso (Barcelono)	12
Esperanto en la Jara Kunveno de Servas	17
Don Kihoto manskribita kaj plurlingva	17
Pri Grupoj kaj Asocioj	18
Esperanto en amaskomunikilio	20
Tago de Poezio	21
Tago kaj nokto de libroj	22
Kurso ĉe UNED (2019-2020)	22
Afriko de la Monda lingvo maljusteco	23
Marcial Villamor Varela (anarkiista esperantisto)	25
El “Mia liriko kaj la muziko”	30
Kjara “Blua horizonto”	32

Ĉefpaĝo: Tri geesperantistoj/ Dorsopaĝo: Capilla-Panteón de Comillas

KONGRESO 2020

En sia plej lasta kunveno en junio, la estraro de HEF decidis akcepti la inviton de la kantabraj esperantistoj okazigi la venontan hispanan kongreson de Esperanto en tiu regiono, komence de majo 2020 (ponto de la 1a ĝis la 3a). Pro la ĵusaj ŝanĝoj okaze de la municipaj kaj regionaj registaroj, ne eblis ankoraŭ konkretigi la lokon kaj plurajn aldonajn necesajn detalojn, sed la samideanoj de Santandero laboras jam por ties difino. Post la somero ni konigos tiujn detalojn, kaj la kondiĉojn por aliĝo, sed dume rezervu la datojn kaj komencu la planadon.

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

PROKOKOLO ORDINARA ĜENERALA KUNVENO

La dimanĉon 5an de majo 2019-a, je la 10:00 h., en dua kunvoko, en la “Casa Diocesana” de Málaga, lokita en Pasaje de los Almendrales, 2-4, laŭleĝe kunvokita de ĝia Prezidanto, oni okazigas la Ordinaran Ĝeneralan Kunvenon de Hispana Esperanto-Federacio (HEF) laŭ la jena tagordo:

1. Legado kaj aprobo de la protokolo de la lasta eksterordinara kunveno 21/07/08
2. Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2018.
3. Aprobo de la raporto pri aktivaĵoj de 2018.
4. Informo pri la anaro.
5. Aprobo de la buĝeto por 2019.
6. Kotizoj por la jaro 2020.
7. Parta renovigo de la estraro, se necese.
8. Projektoj por 2019-20. Pretigado de la ŝanĝo de la estraro en 2020.
9. Modifo de la regularo pri kongresoj.
10. Sugestoj kaj demandoj.

Ĉeestantoj: Ĉeestas 16 membroj kaj estas reprezentataj 4 pliaj (Agueda Biurrún pere de Ricardo Biurrún; Félix Jiménez pere de José Antonio del Barrio; Iciar Arteché pere de Jesús Miguel García; Cristina Pérez pere de José María Rodríguez). Entute, 20 membroj. Ankaŭ estas reprezentataj kvar lokaj asocioj, nome: Madrido, Teruelo, Andaluzio kaj Bilbao.

Laŭ la ordonnumero de la diversaj tagorderoj, jen la decidoj:

1. Antaŭ la komenco de la ĝenerala kunveno, ĉiu membro de HEF ricevis, pere de “Boletín”, la protokolon de la antaŭa asembleo, do oni interkonsentas la nebeznon de ĝia legado. Oni aprobas ĝin unuanime.
2. Antaŭ la komenco de la ĝenerala kunveno, ĉiu membro de HEF ricevis, pere de “Boletín”, resumon de la spezokonto de la jaro 2018, do oni interkonsentas la nebeznon de ĝia legado. Oni aprobas ĝin unuanime.
3. Antaŭ la komenco de la ĝenerala kunveno, ĉiu membro de HEF ricevis, pere de “Boletín”, la raporton pri la aktivaĵoj de HEF dum 2018, do oni interkonsentas la nebeznon de ĝia legado. Oni aprobas ĝin unuanime.
4. Oni informas ke la 31/12/2018, HEF havis 201 individuajn membrojn kaj 15 kolektivajn, t.e., entute 216 membrojn.

Laŭlonge de 2018 estis 12 eksoj y 16 aliĝoj.

5. Antaŭ la komenco de la ĝenerala kunveno, ĉiu membro de HEF ricevis la buĝeton por 2019. La estraro atentigas pri tio ke en ĝi mankas referencoj al la UNED-kurso, kio ne tro ŝanĝigos la buĝeton ĉar plejparte la mono estos por pagi al instruistoj, kaj subvencio de TEJO al HEJS pro ĝia partopreno en projekto subvenciita de Eŭropa Unio, kies pago efektiviĝis kelkajn tagojn antaŭ la dato por tiu-ĉi asembleo, pro kio ne eblis inkludi ĝin en la buĝeto.

Kun tiuj du klarigoj, la buĝeto estas aprobata unuanime.

6. La estraro proponas ke por 2020 estu la samaj kotizoj ol por 2019, kio estas aprobata unuanime.
7. La estraro proponas, kaj estas aprobata unuanime, la jenajn ŝanĝojn en ĝiaj membroj:

William Guerrero D’Azevedo anstataŭas al Alejandro Escobedo Muñoz kiel Prezidanto de HEJS.

Alberto Granados Orcero anstataŭas al Raúl Martínez Anguita kiel voĉdonanto.

8. Projektoj:
 - 8.a. En la nuna estraro de HEF estas malekvilibro inter viroj kaj virinoj. Celo de la estraro estas sendi leteron al virinoj de HEF por inviti ilin eniri la estraron, kiu nepre estos renovigata la venontan jaron.
 - 8.b. Ŝajnas konvena momento por efektiviĝi ian agadon rilate la lingvan situacion de Eŭropa Unio profitante la proksiman baloton por elekti la Eŭropan Parlamenton kaj la tiel nomata “Brexit”. Tiusence la estraro sendos leteron al hispanaj politikaj partioj.

Unu socio proponas ke en la letero oni menciu la oficialan rekonon de Esperanto en Pollando.
 - 8.c. Daŭras la kurso de Esperanto en la UNED, en la nivelo A2. Svarmas la ideo starigi la nivelon B1 por la venonta lernojaro. Tamen la afero ne estas tute klara ĉar estus bezonataj ĉefe homoj por gvidi ĝin kaj pretigi la necesajn materialojn por la lekcioj.

Dume, plu estos la propono pri la nivelo A2, kvankam estus dezirinda la ekzisto de la niveloj A2 kaj B1.
 - 8.d. La estraro memorigas la ĉeestantojn pri tio ke ĝia estrarperiodo finiĝas la venontan jaron 2020, kaj sekve konvenus profiti la nunan jaron por antaŭplani la ŝanĝon. Tiucele, la estraro proponas la ekigon de Elekta Komisiono, kiu esploru la ekziston de eventualaj kandidatoj. Tiu propono estas aprobata unuanime. Oni konsideris kelkajn homojn kaj fine oni decidis ke la nuna estraro nomumu la membrojn de tiu komisiono.

9. La kongresa regularo troviĝas en la retejo de HEF. La estraro proponas du modifojn:

9.1 Disdivido de eventuala monprofito inter HEF kaj la Organiza Komitato: oni proponas duonon kaj duonon.

9.2 Oni proponas la aldonon de nova punkto en la regularo pri la konduto de kongresanoj. La teksto de tiu nova punkto estis jam sendita al ĉiuj anoj de HEF.

Ambaŭ proponoj estas aprobataj unuanime.

10. Rosa López informas pri tio ke AEU (Andaluzia E-Unuiĝo) okupiĝos ekde nun de la organizado de la Internacia E-Semajno (IES), okazigita ĝis nun en Katalunio. Samtempe, ŝi demandas ĉu okazos ĉi-jare; ŝi ankaŭ informas pri la ekzisto malmankanta mono de pasintaj jaroj kaj demandas kion fari kun ĝi se la renkonton ne plu oni organizus.

Angel Arquillos esprimas sian emon organizi la IES sed ke, ĉi-jare, post la organizado de la nun disvolviĝanta triopa kongreso de Málaga, oni vidas malfacilaĵojn por organizi alian kunvenon.

Tamen, José María Rodríguez diras ke ankoraŭ ekzistas la eblo organizi ĝin kaj ke oni faras kelkajn demarŝojn kun tiu celo.

Sen pliaj sekretario. aferoj traktendaj, oni finigas la kunvenon ĉirkaŭ la 11:15 h., kion mi atestas kiel anstataŭanta

Jesús Miguel García Iturrioz,
Anstataŭanta Sekretario

Legas kaj konsentas,

José Antonio del Barrio Unquera,
Prezidanto

Subvencio por partopreni la IJK

En sia kunveno de la 16a de junio 2019, la estraro de HEF aprobis subvencion, ĝis maksimume 1.000 eŭroj, por monhelpi la partoprenon de gejunuloj de HEJS en la venonta IJK, okazonta en Liptovský Hrádok (Slovakio), laŭ la jenaj kondiĉoj:

1. Oni subvencios la partoprenon de du junuloj malpli ol 30-jaraj.
2. la elektitoj oni pagos la kongresaliĝon kaj la vojaĝelspezojn kun la anoncita limo de 1.000 € entute.
3. Oni publikigos la konkurson pere de la kutimaj komunikiloj uzataj de HEF por informi siajn anojn.
4. En tiu publika konkurso oni pritaksos jenajn meritojn:
 - a) Esti HEJS-ano.
 - b) Havi respondecojn en HEJS, nuntempe aŭ antaŭe.
 - c) Esti jam paganta la kotizon 2019 al HEF/HEJS.
 - d) Esti kunlaboranto en “Boletín” aŭ en aliaj komunikiloj de HEF.
 - e) Aŭtori pri libroj, artikoloj, ... en aŭ pri Esperanto.
5. Post la aljuĝo de la subvencioj, oni pagos la duonon de ĉiu subvencio al ĉiu homo elektita.
6. La homoj subvenciitaj prezentos la atestilojn pri la faritaj elspezoj.
7. La homoj subvenciitaj devos prezenti raporton pri la de ili plenumitaj kongresaj taskoj kiel reprezentantoj de HEJS.
8. Post la ricevo de tiu raporto kaj de la elspezoatestiloj, HEF pagos al subvenciatoj la duan duonon de la subvencio.
9. La petoj devas alveni al la estraro antaŭ la 15-a de junio.

En Madrido, la 16an de junio 2019.

ŜANĜO DE ESTRARO

Kiel ni atentigis en pasinta numero de Boletín, en la jaro 2020 devos okazi ŝanĝo en la estraro, kaj kelkaj membroj anoncis ke ili ne kandidatiĝos. Ĉiu ano de la asocio rajtas sin prezenti en la estonta Ĝenerala Kunveno. Por faciligi la procezon, tamen, la Ĝenerala Kunveno okazinta en Malago aprobis la kreadon de Elekta Komisiono, kies tasko estos esplori eblajn kandidatiĝojn. Ni anoncos baldaŭ la konsiston kaj la maniero kontakti ilin. Dume, pripensu vian eblan propran rolon en la estonta organizado de la Federacio.

En la sama Ĝenerala Kunveno, oni aprobis partan modifon de la estraro, ĉefe pro la ŝanĝo de prezidanto de la junulara sekcio. La novaj membroj estas Alberto Granados kaj William Guerrero. Jen iliaj profiloj:



Alberto Granados Orcero, estas 55 jarojn aĝa. Li naskiĝis en Medina del Campo (Valladolid), sed nuntempe loĝas en Teruelo. Li studis Historion, kaj laboras kiel funkciulo.

Li estas prezidanto de la teruela Esperanto-Asocio "Liberanimo" kiun li fondis antaŭ kvar jaroj. La asocio bonege funkcias, ĉar al ĝi apartenas kelkaj entuziasmaj novaj esperantistoj.

Antaŭ du jaroj ni organizis la 76an HEK, kio estis neforgesebla memoraĵo.

Ĉiujare, Liberanimo organizas esperantan kurseton en Teruelo kaj pliajn agadojn (paroladojn, ekspoziciojn, kunvenojn, kunmanĝadojn...)

William Guerrero, naksiĝis en Venezuelo. En 2016 estis lia unua kontakto kun Esperanto kaj en 2017 dumsomere ekestudis kurson per Duolingo kaj post unu monato kaj duono li kuraĝis vojaĝi al Slovakio kiel reprezentanto de HEJS okaze de renkontiĝo de TEJO, kiu helpis al li pere de babildado kun gejunuloj el diversaj landoj kaj dum la sekvantaj monatoj li ade praktikis por plibonigi la lingvon sukcese.

En 2018 li ĉestis la IJK okazita en Badaĥozo, kie li profitis la tutan semajnon por praktikado kaj estis elektita kiel prezidanton de HEJS.

Ankaŭ ĉestis la kongreson KAEST en Slovakio, partoprenis en la projekto de TEJO "FEJ", interalite. De tiam li estas tre aktiva kaj ni esperas ke li daŭre progresos.

La estraro kaj la tura asocio dankas la ĝisnunajn estraranojn, Raúl Martínez Anguita kaj Alejandro Escobedo, pro ilia strebo kaj ilia kunlaboro en la laboroj de la estraro.



RAPORTO PRI LA TRIOPA KONGRESO DE ESPERANTO OKAZINTA EN MALAGO 2019

Finiĝis la Triopa Kongreso de Esperanto kaj la novaj organizantoj preparas novan Triopan Kongreson, t.e. IFEF, Germanio kaj Pollando. Saĝa ideo! Mi deziras ĉion bonan al la nova LKK, kvankam ĉe la nordo la vetero estos malpli varma sed same etosa, pri tio mi konscias kaj deziras.

Kiel multaj el vi scias, ni kapablis kunigi ĉirkaŭ 180 homojn el pli ol 25 landoj en alloga konstruaĵo, kun la celo profiti la nombrajn prelegojn, komunan manĝadon, kaj tiel plu.

Kiel membro de la LKK mi valoras nian longan kaj pezan laboron, ĉar ni kunsidis multajn fojojn ĉe oficejoj de la urbodomo, entreprenoj, hoteloj, kaj finfine ni elektis la t.n. Dioceza Domo, ĉe la Katolika Seminario de Malago, kie ni en bonega etoso, ĝuis la komfortajn dormoĉambrojn, salonetojn, salonegojn, terason, puran aeron, ktp. Mankis nenio por okazigi la ambician Triopan Kongreson.

Pri la invititoj kaj prelegantoj, elstaras: Margareta Zaleski-Zamenhof, pranepino de la kreinto de Esperanto, Ilona Koutny, profesoro de la Universitato de Poznano, Federico Gobbo, interlingvisto esperantologo, Seán O'Riain, juristo diplomato kaj doktoro per lingvapolitika tezo pri lingvo-planado en Irlando kaj Kebekio, Katalin Kovats, filologo kaj metodologo, diplomiĝinta pri esperantologio en la budapeŝta universitato ELTE. Dennis Keefe, usona instruisto, profesoro en la Universitato de Nankino (Ĉinio).



Ankaŭ menciindas esperantistaj homoj kiel David Galadí, naskiĝinta en Kordovo, fizikisto kaj astrofizikisto, José María Rodríguez, Advokato de la Hispana Ŝtata Administracio, Miguel Fernández, verkisto kaj poeto, aŭtoro kaj tradukisto de kelkaj poemoj kaj noveloj, iniciatinto de la Lirikaj Festoj de HEF kaj Vivu la Teatro, ktp. Miguel Gutiérrez Adúriz, kemia Inĝeniero, aŭtoro de pluraj noveloj kaj la vortaro Amika, eksmembro de la Akademio de Esperanto, ktp, ktp. Ĉiuj partoprenis la Triopan kongreson per prelegoj, teatraĵoj...



Mencii ĉiujn partoprenantojn igus ĉi raporto enuan kaj mi preferas paroli pri diversaj momentoj, kiuj estas vere interesaj kun artistoj profeziaj kaj amatoraj, komikaj kaj dramaj, amuzaj kaj gloraj kiel "Concerto Málaga", grupo el 13 homoj, kies muziko translokigis nin en la ĉielon, aŭ Rocío Alba, malagana kantistino, kiu plenigis la salonon je beleco, dian aromon kaj romantikan muzikon. Ŝi kantis koplon, (poezia kunmetaĵo de kvar versoj oksilabaj, ĝenerale kun rimaj konsonantoj en la paraj versoj kaj sen rimo en la neparaj, destinitaj al kantado. Ŝi ankaŭ ludis la t.n. "Sevillanas" (Populara muzika kunmetaĵo, laŭ alterna ritmo de tri je ok kaj du per ok taktoj, kun kiu ĉi tiu danco estas akompanata.

Pedro Carrillo, diplomiĝinto en drama arto, surprizis nin per bela komika spektaklo kun dancado kaj opera kantado, interalie.

Maria Grazia Barboni, itala kantistino, kantis en diversaj momentoj kaj emociigis nin per belaj esperantigitaj mondkonataj kantoj.



Ne mankis teatro, ĉar la esperantista granda aktoro Saša Pilopovic, ludis la teatraĵon *Vivo de Galileo* kaj la originalaj *Ciganaj Kantoj*, kiuj jam famas en Esperantio.

La simpatia muzik-paro Kajto, kontaminis la etoson per ilia muziko kun novaj kanzonoj kaj kutima rideto akompanataj de diversaj musik-instrumentoj, brile ludataj.

Pri la ekskursoj, mi sentas min tre fiera, ĉar unue ni timis ke ni programis multajn ekskursojn, sed ĉiuj realiĝis kaj ĉiuj sukcesis. multaj grupoj da homoj ĝuis kelkajn pro-meandojn tra Malago, ekskurson al urboj Antekero, Rondo, Granado, Kordovo, Medina Azahara, Zafarraĵo kaj Botanika Parko. Mi dankegas la volontulojn, kiuj helpis nin kaj la respondeculojn de la Dioceza Domo, kiuj ĉiam estis pretaj helpi nin kaj aranĝi ĉion akurate kaj senprobleme.

Por fini mian raporton mi ne povas forgesi la kernon de la Triopa Kongreso, ĉar la prezidento de IFEF Rodica Todor proponis al ni ĉi gravan eventon "ĝuste por festi sian jubileon en la sama lando kie ĝi naskiĝis", kaj la evento iĝis neforgesebla kaj nekomparebla. Mi esperas ke ĉiuj fervojistoj kaj ceteraj geesperantistoj, ĝuos novan kongreson en Germanio.

Ángel Arquillos

104-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO LAHTIO (FINNLANDO)

-Vivanta naturo, floranta kulturo-

Laŭ la Dua Bulteno pri la 104-a UK, estos du kongresejoj, tamen la ĉeestontoj ne atingos la milon. Sed Finnlando estas grava loko por ĝui la naturon kaj la agrablan someron, ne tre varma, sed sufiĉe milda por eviti ŝvitadon... Mi eble ne sopiros mian Andaluzion, ĉe la sudo de Hispanio, kie la vetero dum julio varmegas, mi certas ke ne, ĉar la progra-



mo pri ekskursoj estas tre varia, kaj la provizora progra-
mo pri prelegoj kaj amuzaj
eventoj estas kiel kutime,
alloga kaj distra por ĉeesti la
plej interesajn eventojn. Lah-
tio estas malgranda urbo, sed
bela kaj moderna, tre konata
en la mondo pro skiado ĉar
ĝis posedas unu el la plej fa-
maj trampolinoj en la mondo.
La lago Vesijärvi estas
vizitinda. Tie oni povas viziti
la Muzeon pri telefonio kaj

inter aliaj distroj, ni povos entrejniĝi al Sankta Peterburgo, kiu estas relative proksime.

Ni havos la eblecon ĉeesti E-kursojn kaj "Finna Eksprese" por interkompreniĝi kun la popolo. Ne mankos teatro kaj kongresa balo post la bankedo, mi ne scias ĉu kiel en aliaj UK-oj, kie la nepartoprenantoj en la bankedo rajtis kundancadi. Bedaŭrinde mi ne scias pri la prelegontoj, sed mi ne dubas pri la kvalito de la prelegoj. Tamen okazos

konkurso pri Publika
Parolado, vizito al la
urbodomo kaj
Koncerto. Ne mankos
la jam fama piedpilka
matĉo, Aŭkcio,
Esperantologia
Konferenco, Belartaj
Konkursoj, Centra
Oficejo respondas,
Internacia Arta
Vespero, ktp.





Preskaŭ ĉiutage okazos ekskursoj kaj promenadoj, sed mi ne povas certigi ĉu eblos aĉeti biletojn por partopreni, mi esperas ke jes, ĉar oni vizitos buse la urbon Helsinko, la muzeon de Muminuoj, Muzeon de Aŭtomobiloj, oni faros busan rondveturon en Tamporeno,

busan veturon al la lago Tuusulanjån, du subĉielajn akvovojojn Vääksy kaj Kalkkinen. Mi ne priskribas ĉiujn ekskursojn, ĉar temas pri dek, kaj la nomoj de vizitendaj lokoj estas strangaj por mi, sed mi certe partoprenos kelkajn kaj post la fino de la kongreso, mi denove verkos raporton, ĉefe pri kio mi spertis.

La antaŭkongresaj kaj postkongresaj ekskursoj estas allogaj, sed bedaŭrinde jam ne plu eblas aliĝi. Inter la plej gravaj estas Vizito al Helsinko, Baltmara perlo, Krozado al Sankt-Petesburgo, Okcidenta Finnlando kaj Norda Finnlando.

Proksimume mi informis, ne tro detale, sed surbaze de la Dua Bulteno, mi kapablis verki ĉi raporton, kiun mi esperas ke estos agrabla por vi.

Ĝis baldaŭ en Finnlando!



Ángel Arquillos

(Mi pruntis la fotojn de la kongresa paĝaro)



SURVOJE AL LA 92-a SAT-KONGRESO

Jam 141 homoj aliĝis al la venonta SAT-kongreso, okazonta en Barcelono inter la 4-a kaj la 11-a de aŭgusto 2019. Ken kelkaj informoj prie, espereble ili konvinkos vin partopreni ĝin!

Kongresejo

Ni elektis ne tro multekostan kongresejon en laborista kvartalo (Horta), bone konektita kun la urbocentro pere de metroo kaj busoj, kaj proksime de la montaro. Temas pri bieno de la salezaj monaĥoj, kiu havas belegan ĝardenon, senornaman loĝejon, tradician manĝejon kaj plurajn salonojn por kursoj, atelieroj kaj prelegoj. La manĝejo kaj parto de la loĝejo lokiĝas en modernisma konstruaĵo de la 19-a jarcento, kiun posedis burĝa familio. Tiu familio havis en sia ĝardeno veran bestoĝardenon! Nuntempe, oni kunlaboras kun pluraj asocioj, inkluzive de la Ruĝa Kruco, kiuj ne nur kunvenas tie, sed ankaŭ uzas ĝin kiel rifuĝejon por senhavuloj. Dum la hispana milito kaj socia revolucio la kongresejo rolis kiel pedagogie noviganta lernejo por orfaj geinfanoj. En 2019 oni rememoras la okdekjariĝon de la fino de tiu milito. Sekve, al tiu datreveno la kongreso dediĉos plurajn programerojn.

Aliaj datrevenoj

En 1909 Barcelono estis konata kiel la *fajra rozo* pro la protestoj (ĉefe de virinoj), kiuj ekestis kontraŭ la deviga partopreno de junuloj en la nordafrika Rif-milito. Jen la kialo de rozo en la kongresa emblemo. Tiuj protestoj kaj ilia perforta subpremado fare de la registaro

konatiĝis kiel Tragika Semajno, kaj okazis nur du monatojn antaŭ la 5-a UK en la sama urbo. Fine, ni ne forgesu gravan sukceson de la laborista movado: *La Kanada*. Post longa striko en februaro kaj marto de 1919, oni atingis per la unua fojo en Okcidenta Eŭropo unu el ĝiaj plej dezirataj celoj, nome la 8-horan labortagon. En la zorgiga nuntempo indas memorigi tiajn eventojn kaj defendi ties rezultojn. Kadre de la kongreso, ni homaĝos niajn antaŭulojn kaj priparolos tiujn ĉi temojn.

Programo

Malfermite al ĉiuj, kvankam nur la asocioj rajtos voĉdoni, kunvenos la diversaj SAT-frakcioj: liberecana, komunista, sennaciista, de verduloj, poresperanta fako, LEA-komitato, Eldona Fako Koperativa, vegetara, de liberpensuloj... kune kun rilataj aranĝoj, kiel la ĝenerala asembleo de SAT en Hispanio. Krome, estos buntaj kaj ampleksaj libroservoj kaj diskoservo. Ni havos ankaŭ aŭkcion, kie eblos aĉeti eraraĵojn. Aliflanke, en la foto-konkurso gajnos premiojn tiuj (amuzaj) fotoj dum/pri la kongreso, kiuj sukcese kaptos interesan momenton. Profesiaj fotistoj bonvenas, sed ankaŭ amatoraj. Fine, estos diversnivelaĵoj de Esperanto. Kaj por komencantoj, kaj por progresantoj, kaj por tiuj kiuj ŝatas babili kaj praktiki la internacian lingvojn kun esperantistoj el aliaj mondopartoj.

SAT estas asocio de (mal)samideanoj, kiuj ŝatas diskuti pri politiko. En Barcelono ni tion faros kadre de debatoj kaj sociaj forumoj, en kiuj ĉies opinioj bonvenas. Interalie, pri: la situacio en Katalunio, malsamaj sistemoj inter socialismo kaj kapitalismo, la rolo de Esperanto en alternativaj (nacilingvaj) eldonprojektoj, niaj sentoj pri ebleco de

disfalego de nia vivmaniero, ciferigita mono en sennacia socio ktp. Kaj kompreneble oni proponos vastan kvanton de diverstemaj preleĝoj (kaj preleĝetoj kadre de peĉakuĉaj sesioj) pri plej diversaj temoj. La lastaj eroj kiuj ni ĵus enprogramis estas: sesio pri (demandoj kaj respondoj pri) Norda Koreio, kun partopreno de homo tre ligata al la tiea registaro, kompreneble kun esperanta interpretado; ateliero pri nepalaj dancoj kaj aliaj kulturaĵoj fare de esperantistino el Katmanduo; kaj preleĝo pri familiaj travivaĵoj dum la Retiriĝo (1939), de Floréal Martorell, kiu ankaŭ certigos profesionan teknikan flankon de la arta programo. Aliaj detaloj kaj informoj troveblas en la vikipedia artikolo pri la kongreso: [https://eo.wikipedia.org/wiki/92-a_SAT-](https://eo.wikipedia.org/wiki/92-a_SAT)



Kunlaboro de lokaj asocioj

Ni volis profiti la okazon por plifortigi la ligojn de la esperantistoj kun la loka socio. Tiurilate ni interkonsentis kun pluraj grupoj. Ekzemple, la Popola Enciklopedia Ateneo permesis al ni montri sian bonegan ekspozicion pri la striko de la Kanado, kiun ni tradukis en Esperanto. La ĉefa pacifisma asocio de katalunio nomiĝas Fundipau (Fondaĵo por Paco) kaj same permesis al ni montri sian interesegan ekspozicion pri la situacio (inkl. de kialoj kaj sekvoj) de la nunaj rifuĝintoj. Ankaŭ partoprenos el Mallorca la liberecana eldonejo Calúnnia, kiu prezentos du librojn en Esperanto eldonitajn okaze de la kongreso. Plurajn filmojn ni spektos en urba kinejo, nomata *La Cinetika*, kontraŭkapitalisma, feminisma kaj sendependa, mastrumata de pluraj asocioj. Krome, oni prezentos prelegon pri la uzo de Esperanto fare de la kataluna registaro dum la hispana milito fare de universitata fakulino.

Muziko, danco, kino, beletro, teatro kaj pup-teatro

Ni proponos buntan kulturalan programon, en kiu ĉiu partoprenanto trovos interesan erojn. Ekzemple: atelieron pri katalunaj kaj tutmondaj dancoj, du malsamajn artajn spektaklojn gvidatajn de Miguel Fernández, du teatrajn monologojn de la profesia aktoro Saša Pilipovic, aparte interesa pup-teatraĵon de la kompanio Titeres Desde Abajo (pro kiu ili estis enkarcerigitaj!), koncertojn de Kaj Tiel Plu kaj JoMo... Krome, prezenton de nova papera eldono de la Plena Ilustrita Vortaro (PIV), kun la partopreno de kelkaj el la respondeculoj pri tiu eldono. Kaj ankaŭ renkontiĝo kun Abel Montagut, aŭtoro de nun konstruata verko rilatanta al Kristoforo Kolumbo. Fine, pluraj filmoj spekteblas en vera urba kinejo, substestigitaj en Esperanto. Interalie, *Teron kaj Liberon* de la brita reĝisoro Ken Loach pri la hispana milito kaj revolucio; kaj *La bruligita urbo* (katalune, *La ciutat cremada*), de Antoni Ribas priskribanta la historion de Katalunio inter 1899 (hispana-usona milito) kaj 1909. Krome videblas



dokumenta filmo pri Liberaĵo Virinoj aŭ Mujeres Libres, feminisma liberecana grupo en Hispanio, aktiva en la 1930aj jaroj. Konfirmote projekciigos du aliaj filmoj: *Kapitano Falco* (portugale, *Capitão Falcão*), humuraĵo pri la portugala Revolucio de la Diantoj; kaj kortuŝa portugala dokumentfilmo *Terra Franca* pri laboro/familio

Naturo

Estante proksime de la montaro, ni ne povis ne profiti la okazon por konatiĝi kun la naturparko Collserola. Interalie, ni vizitos Can Masdeu, paradizo por la amantoj de la naturo kaj de la alternativaj vivmaniero, gvidata de unu el ĝiaj fondintoj: la esperantisto Brian Rusell. La abandonitan lepromalsanulejon okupis internacia grupo en 2001, post 50 jaroj de neuzo. Krome, kadre de tuttaga ekskurso ni vizitos konatan montaron Montserrat. Kaj ni ne forgesu la belegan ĝardenon de la kongresejo, kiu permesos al Marcelo Redulez kaj Klodin' Pomiról gvidi aron da distraj sed ankaŭ instruaj programeroj. Ankaŭ proksime de la kongreso estas eksterordinara parko, nomata Labirinto, tre amata de la barcelonanoj, aparte de la infanoj.

Ekskursoj

Ni proponas du tuttagajn ekskursojn, kiuj okazos kiel tradicie la merkredon de la kongresa semajno: Subirats kaj Moià.

Ne malmultaj legantoj jam konatiĝis kun la vorto *Subirats*. Tie estas grava Muzeo de Esperanto, fondita en 1968 de Luis Hernández Yzal kaj regule vizitata, aparte de esperantistoj. Kaj pro tio multaj el la turismaĵoj de la ĉirkaŭaĵo havas informojn ankaŭ en Esperanto. Interese, ĝi situas en regiono fama pro la kvalito de ĝiaj vinoj. Pro tio la ekskursko inkludos viziton al kooperativa vinejo. Krome, ĝuste en tiu vilaĝo situis la lastan defendlinion de Barcelono dum la hispana milito, kiu nuntempe viziteblas.

Ankaŭ en *Moià* troveblas trezoraĵo de nia kulturo. Temas pri la biblioteko Ramon Mollera, nuntempe prizorgata de lia filino Anna Maria. Ŝi klarigos ĝian intereseĝan historion kaj montros al ni kelkajn el la plej valoraj eroj de la grandega kolekto, kiun tiu biblioteko posedas. Krome, ŝi gvidos turisman viziton al belan vilaĝon, kiu kaŝas plurajn surprizojn, inkluzive de fascina parko. Antaŭ la tagmanĝo, ni vizitos la montaron



Salonoj de la kongreso

La speciala kongresejo permesas al ni homaĝi multajn antaŭulojn: Lidja Zamenhof, filino de la iniciatinto de Esperanto, kiu alfrontis la nazismon en Varsovio kaj pereis en Treblinka; Eugène Adam, fondinto de SAT, kiu inspiris plurajn generaciojn de satanoj per sia maldogmo kaj malfermo al alies opinioj; fratinoj Teresa kaj Eulàlia Rosell, instruistinoj kiuj aŭtoris la devizon de Kataluna Esperantista Federacio “Maro estas gutaro” (Eulàlia), kaj kiuj membris en la unua estraro de loka e-asocio en 1907 (Teresa); Germinal Gracia, ekzilito, kuneldoninto kun Eduardo Vivancos de la liberecana *Senŝtatano*, kaj verkisto de trideko da altkvalitaj libroj pri siaj vojaĝoj; Jaume Grau, vicprezidinto de la Akademio de Esperanto kaj verkisto de *Tagoj kaj Ruinoj*, kiu ĉefprelegis en la valencia SAT-kongreso en 1934; Concha Monrás, anarkiistino, edziĝinta al aragona intelektulo Ramón Acín, kiu danke al premiita loteria bileto financis la filmon *Las Hurdes* de Luis Buñuel; Domènec Masachs, anarkiisto, kiu klopodis murdi la diktatoron Primo de Rivera pere de ponardo - elirinte malliberejon, li daŭrigis pasie sian afablan instruadon de Esperanto; Trinitat Garcia, kiu migris infanaĝe el Murcio al Katalunio, kaj kiu verkis *Mia vivo, mia granda batalo* [ŝia filo] *kaj mia subteno* [Esperanto]; Teresa Carbó, instruistino kiu kunfondis *Akademion Enciklopedian de Esperanto*, kunorganizis la *Ruĝan Helpon*, kaj helpis el Francio al fuĝintoj de la nazismo; Jacint Comella, pentristo, edziĝinta al esperantistino el pli malalta socia klaso (tiel rezignante sian familian heredaĵon), kaj sekretario de la komitato por gastigo de aŭstriaĵ infanoj en 1920; Paul Berthelot, anarkiisto, kiu fondis la revuojn *Esperanto* kaj *Internacia Socia Revuo*, kaj la unuan societon por kunigi la katalunajn esperantistojn. Jaume Viladoms, pedagogo, sindikatisto kaj socialisto el Sabadell, kiu suferis ekzilon kaj malliberejon; Ramón Fernández Jurado, politika aktivulo kaj poeto, kiu membris en la Juĝkomisiono de la Internaciaj Floraj Ludoj; Maria Julivert, instruistino, kiu ĉefrolis en pionira feminisma movado kaj tradukis al la kataluna lingvo *Esenco kaj Estonteco de la ideo de Lingvo Internacia*; Germaine Rebours, sekretiino de la 5-a UK en Barcelono kaj iniciatinto de servo de katalunaj leter-amikinoj al soldatoj de la unua mondmilito. Fine, en konstruaĵo de salesianoj de Don Bosco kompreneble enestas kapelo, kiun ni dediĉas al pastro Manuel Casanoves,



kunfondinto kaj unua prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio, kaj fondinto kaj unua prezidanto de la hispana sekcio de Amnistio Internacia.

Se vi volas scii pli, kontaktu nin je:

satbarcelona2019@gmail.com

Saioa Escobar kaj Xavi Alcalde (nome de la OKK de la SAT-kongreso en Barcelono 2019)

Xavi Alcalde

ESPERANTO EN LA JARA KUNVENO DE SERVAS-HISPANIO

La prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio estis invitita prelegi pri la internacia lingvo en la jara landa kunveno de la asocio SERVAS, dediĉita al la instigado al la paco per vojaĝo kaj gastigado, en Salamanko, la 6an de aprilo.

La ĉeestintoj montris grandan intereson pri la lingvo Esperanto, el kiu devenas ĝuste la nomo de la asocio, kiu havas multajn komunajn aspektojn kun la esperantista movado. La rezulto estis kontentiga kaj malfermiĝis novaj ŝancoj por kunlaboro inter ambaŭ asocioj. Homoj interesiĝantaj pri SERVAS, povas legi la priskribon kaj celojn de la asocio en la retejo www.servas.es.

La kontaktojn peris nia koleginino Teresa Rivero, membro de SERVAS kaj de la sevila Esperanto-grupo.



KULTURO

DON KIĤOTO MANSKRIBITA KAJ PLURLINGVA

Finfine aperis la eldono de la verko Donkiĥoto, manskribita kaj plurlingva, kiun ekpretigadis de antaŭ longe la urbestro de El Toboso (la urbo de la ĉefrolulino manskribitaj de volontuloj kaj ilustritaj per bildoj ankaŭ de volontuloj. La parto en Esperanto, en kiu kunlaboris Fundación Esperanto, estas la ĉapitro 37 de la dua parto Dulcinea). Speciala eco estas ke ĉiu ĉapitro estas en diversaj lingvoj, kaj ili aperas, inter la paĝoj 208 kaj 212.

Oni povas legi ĝin en la reto, en la Bita Biblioteko de Kastilio-Manĉo, BIDICAM. Tie serĉu “Quijote políglota” kaj tie la menciitan ĉapitron. La teksto troviĝas ankaŭ en la Bitoteko de HEF.



PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Alikanto



EKSPOZICIO PRI ESPERANTO EN MUTXAMEL

Inter la 7a kaj la 28a de junio, ĉiutage de lundo ĝis sabato, estis montrita ekspozicio pri Esperanto en la Domo de la Kulturo de Mutxamel (urbo en provinco Alikanto, Valencilando). Ĝi finiĝis per vizito gvidita de nia asociano José Miguel Bernabeu.

Ni rememorigas ke la ekspozicio pri Esperanto estas je la dispono de ĉiu grupo aŭ aktivulo kiu deziras disvastigi Esperanton en sia urbo. La muntado estas facila kaj senpaga, kaj HEF pagas eĉ la kostojn pri transporto. Kontaktu kun la estraro por esplori la detalojn.

Andaluzio

Sevilo

PRELEGOJ ENKONDUKAJ PRI ESPERANTO EN SEVILO



Dum monato aprilo okazis du enkondukaj prelegoj pri Esperanto en la Fakultato pri Filologio de la Universitato de Sevilo. La unua, titolita «Esperanto: pli ol internacia linvoj. Ni parolu!» okazis la 12an de aprilo, kaj ĝin gvidis Vicente Manzano-Arrondo, profesoro de tiu universitato. La dua okazis la vendredon 26an de aprilo, kun escepta invitito, prof. Ilona Koutny, respondeculo de la

kursoj pri Esperantologio de la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando), kiu prelegis pri «Kiel Esperanto eliris el la provotubo kaj kial ĝi estas bona ilo por la internacia komunikado». Ĝi okazis en la sama Fakultato de Filologio kun dulingva interpretado.

SEMINARIO EN SEVILO PRI LINGVOPOLITIKO EN AFRIKO

Dum ses sinsekvaj mardoj, inter la 21a de majo kaj la 25a de junio disvolviĝis seminario pri la lingva maljusteco en Afriko, "África en un mundo de idiomas", organizita de la Universitato de Sevilo, kunordigita de nia kolego Vicente Manzano.

Dum kvin sesioj oni pritraktis la situacion de apartaj landoj, per komunikado kun personoj de tiuj kvin landoj. La oficiala lingvo estas la hispana, sed la komunikado kun la afrikaj kunlaborantoj okazis Esperante, kaj la pdf-libro pri la evento disponeblas du lingve. Ankaŭ la videoj estos subtekstigitaj.

Pliaj informojn, en <http://institucional.us.es/marco/>.

ESPERANTO KAJ SCIENCA POPULARIGO

Alia agado de Vicente Manzano: la pasintan 22an de majo en Kadizo, en la kafejo Pay-Pay, Vicente partoprenis kiel preleganto en la agado "Pint of Science", kiu estas ĉiujara sperto, kiu okazas en pluraj landoj samtempe, kaj kies celo estas faciligi la aliron de la homoj al la scienco aŭ al la rezulto de esploradoj. Li parolis pri tio, kio estas Esperanto kaj kial li aliris pro sciencaj kaj etikaj kialoj, kaj instruis pri sinprezentado. Post la prelegeto, pluraj personoj montris sian surprizon kaj scivolemon, kaj sian deziron scii pli pri la lingvo.

Madrido

EKSPozICIO PRI PEDAGOGIO KUN ESPERANTISTA ROLULO

Esperanto havas alian interesan aperon en grava ekspozicio nun montrata en la Muzeo de Historio de Madrido, en la hispania ĉefurbo, pri la edukado en la urbo inter la jaroj 1898 kaj 1938. Inter la ĉefroluloj de la klopodoj por pedagogia renovigo aperas Sidonio Pintado, kaj en la video al li dediĉita estas menciata lia esperantista rolado, kaj la internaciaj kontaktoj kiujn li ligis pere de Esperanto kun aliaj internaciaj figuroj de la pedagogio. Ni memorigu ke Sidonio Pintado estis prezidanto de la Hispana Esperanto-Asocio en la jaroj 1935-36, kaj li estis mortpafita tuj post la fino de la intercivitana milito. Eblas legi pli pri lia rilato al Esperanto en numero 376 de Boletín.

Valencio

ŬASAPA RADIO, NOVA SPERTO ĈE LA GRUPO DE ESPERANTO DE VALENCIO

La Grupo organizis novan aktivaĵon, kiu konsistas el sendi tekstan mesaĝon per ŭasapo, pri la eventoj okazintaj kaj okazontaj ĉe nia Grupo dum tiu semajno. Sed la novaĵo estas pro tio ke ankaŭ oni sendas la aŭdan version.

La du ĉefaj "raportistoj" estas Dennis kaj Elías, kiuj ĉiu-semajne publikigas "elsendon" kaj tekste kaj aŭde. leganto kaj aŭskultanto, oni povus certigi ke tiu nova aktivaĵo multe plaĉas, kaj oni demandas

Pro la kuraĝigaj komentoj de ĉiu al ni kial tiu agado ne disvastiĝas tra la tuta lando. El ĉi-tie ni kuraĝigas ĉiujn hispanajn Esperanto-Grupojn, por ke ili faru same.

Okaze de ia dubo pri tio, vi povos kontakti Elías per ŭasapo ĉe 656841843, kaj min. De antaŭ jam pli ol du monatoj, la Grupo de Esperanto de Valencio volonte sendos al vi mian lastan elsendon ĉe Ŭasapa Radio, por klarigi tion iomete plu ...

ESPERANTO EN AMASKOMUNIKILOJ

Esperanto plu montriĝas interesa temo por amaskomunikiloj. Dum pasintaj monatoj ĝi aperis en tre interesaj okazoj, kelkaj rilataj al kulturaj aferoj.

La numero 3 de la nova gazeto pri lingvo kaj literaturo, "Archiletras", entenas ampleksan raporton pri Esperanto, speciale el la vidpunkto de la literatura kreado. La ĵurnalistoj intervjuis la prezidanton de HEF, José Antonio del Barrio kaj esploristoj kaj literaturistoj kiel Miguel Fernández, Roberto Garvía kaj Javier Alcalde, kaj ankaŭ vizitis kurson de Esperanto en Barcelono kaj parolis kun lernantoj. La tekston eblas legi en la Bitoteko de HEF.

La numero 44 de la internacia gazeto pri komunikado "Ámbitos", eldonita de la Universitato de Seviljo, publikigas artikolon de Patricia Merello Guzmán pri "Esperanto en la ĵurnalistaj medioj: alproksimiĝo al la esperantista historio de Hispanio". Ĝi estas resumo de ŝia laboraĵo pri al sama temo farita por ŝia fino de universitata studo pri ĵurnalismo. La tekston eblas legi en la retejo de la gazeto.

Inter la raportoj pri Esperanto mem elstaras tiu aperinta en la loka ĵurnalo de urbo Taragono, kun informo pri la urba grupo, kun titolo "Esperanto, frateca lingvo en Taragono". Ĝi estas legebla en la retejo de la ĵurnalo.

Okaze de la 80a datreveno de la Hispana Intercivitana Milito, la ĵurnalo "La Razón" publikigis specialan dosieron, kiu entenis intervjuon-raporton kun la veterana esperantista verkisto kaj historiisto Antonio Marco Botella, pri lia sperto en la postmilita periodo kaj la ekzilo.



Ankaŭ menciindas la biografioj pri gravaj aŭ interesaj homoj el la provinco Teruelo, kiujn publikigadas historiisto Serafin Aldecoa en la ĵurnalo Diario de Teruel, inter kiuj tiuj dediĉitaj al la "defendanto de Esperanto" Julio Belenguer (vidu apudan bildon), aŭ al la virinoj

pioniraj en la esperanta movado kaj la edukado, kiel Sara Maynar kaj aliaj.

En la teruela stacio de la radio Cadena Ser estis elsendita intervjuo kun la prezidanto de la loka grupo "Liberanimo", Alberto Granados, okaze de la debato organizita en la kulturejo Casino de Teruel pri la temo "La lingvoj en la pasinto, la nuno kaj la estonto: el la mezepoka aragona ĝis Esperanto".

Fine, la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, estis intervjuita en programo "Vojaĝo al la Centro de la Nokto", kiun elsendas la ŝtataj radiostacioj Radio 5 (en la nokto de la 26a de majo) kaj Radio Exterior. Ĝi estis reeldsendita la 1an de junio vespere en Radio 1. La intervjuo estas aŭskultebla kiel podkasto en la retejo de la "Nacia Radio", serĉante per la nomo de la programo.



TAGO DE POEZIO

Okaze de la Tago de la Poezio, la 21an de marto, la Universitato Complutense omaĝis grandan poeton, la katalunan Joan Margarit, per libro kolektanta liajn poemojn en pluraj lingvoj, inter kiuj la internacia. La libro titoliĝas "Margarit Universal", kaj enhavas unu poemon tradukitan al Esperanto, tiun nomatan "Monumento al la mortintoj de la korea milito", tradukitan de Jorge Camacho, kiu aperis antaŭe kun aliaj verkoj de Margarit en la literatura revuo Beletra Almanako. La prezento okazis la 21an de marto en la Fakultato de Filologio de tiu Universitato, kaj dum ĝi estis deklamitaj pluraj poemoj, inklude de tiu en Esperanto. Pri tiu ĉi zorgis Andy Hernández, al kiu eblas vidi en la oficiala registrado de la evento, ĉe: <https://www.youtube.com/watch?v=w9HiXln8KOE&t=4680>

Ankaŭ okaze de la Tago de Poezio, la sabaton 23an de marto oni celebris malferme en radiostacio Radio Utopía omaĝon al la poeto José Agustín Goytisolo pro la dudeka datreveno de lia morto. Estis deklamitaj pluraj poemoj ne nur de Goytisolo sed ankaŭ de la poetoj partoprenintaj. Deklamis interalie: Miguel Fernández, kiel unu el la organizantoj, prezentita kiel poeto en Esperanto, Jorge Camacho kaj Ana Manero. Eblas elŝuti kaj aŭskulti la elsendon en mp3 en la retejo de la Radio: <http://www.radioutopia.org.es/>.

Pro la sukceso de la evento, la omaĝon oni ripetis la sabaton 25an de majo en la konata kulturcentro Ateneo de Madrido, kun partopreno kaj kunorganizado de la Esperanto-poeto Miguel Fernández, kiu denove deklamis en la internacia lingvo.



TAGO KAJ NOKTO DE LA LIBROJ



Esperanto denove rolis dum la sinsekva kompleta legado de la verko Don Quijote de La Mancha, en la Círculo de Bellas Artes, okaze de la Tago de la Libro. Peru kaj Manolo legis du pecojn de tiu verko en Esperanto, la merkredon 24an de aprilo.

La 26an de aprilo disvolviĝis nova celebrado de “la Nokto de la libroj,

kiun organizis la Registaro de la Madrida Regiono, ĉijare kun speciala atento al la figuro de Federico García Lorca, en la centa datreveno de lia veno al Madrido. Madrida Esperanto-Liceo partoprenis per tre interesa prelego de Miguel Fernández pri la poezio de Lorca, kaj ties kunteksto, kun titolo “Lorca, poeto ekstreme universala kaj ekstreme loka”, en nia sidejo. Partoprenis deko da ĉeestantoj, ankaŭ neesperantistoj.



KURSO ĈE UNED 2019-2020

La kurso de Esperanto en la Centro por Lingvoj CUID de la Universitato UNED finiĝis en junio, sed ni povas konfirmi ke ne temos pri izolita okazigo: la venontan kurson oni denove kunvokos kurson por la nivelo A2. La estraro de CUID krome akceptis la lanĉon de kurso en la nivelo B1. La respondeculoj de HEF kaj de la kurso decidis tamen ke tiu nivelo ne estos lanĉita ankoraŭ por la venonta akademio jaro, ĉar ni ne povas garantii la adekvatan kreon de la materialo pro la mallonga tempo aljuĝita al ties disvolvado. Do, oni lanĉos ĝin por la sekva jaro 2020-2021.

Por tio, HEF lanĉas alvokon al spertaj esperantistoj, por peti ilian kunlaboron en la pretigado de la materialo por krei kurson je nivelo B1 por neĉeestaj lernantoj. Se ni sukcesas krei bonan skipon, ni pensas ke la laboro ne estos tre granda, kaj ĝi povas doni eĉ pli altan prestiĝon por nia agado ĉe UNED. HEF certe rekonos tiun laboron, kaj pretas doni oficialan certigilon, kiel kunlaborantoj, kiujn oni povu utiligi oficiale, kaj ankaŭ kiel merito por instruado. Jam dum la kongreso en Malago kelkaj samideanoj montris sian pretecon kunlabori, kun la kunordigo de Fabián Jiménez, instruisto en mezlernejo en Vélez-Málaga kaj respondeculo de projekto Erasmus+. La ĉefa respondeculo de la projekto UNED plu restos Manuel Pancorbo, profesoro de tiu universitato.

Se vi iel pretas kunlabori, bv kontakti kun HEF, kaj ni informos vin pri la detaloj.

AFRIKO, SPEGULO DE LA MONDA LINGVA MALJUSTECO

"Neniu volas alparoli siajn infanojn per la lingvo de sia etna grupo, sed pli prefere per la kolonia lingvo. Neniu pretas sin vesti tradicie, manĝi tipajn manĝaĵojn, kiujn oni konsideras maltaŭgaj..."

Estas vortoj de Adjévi Adjé, parolanta pri la lingva dimensio en Togolando. Joel Muhire priskribas la situacion en la Demokratia Respubliko Kongo per "En lernejoj, infanoj eklernas unue skribi la lingvon de sia regiono kaj pli poste la francan, oficiala lingvo (..) Krome, la angla estas instruata en mezaj kaj altaj lernejoj. Tamen nur malmultaj signifefe atingas bonan parolkapablon de la angla lingvo. Malgraŭ ĝia hegemonio kaj verŝajna facileco, la angla restas la plej malfacila lingvo por multaj konganoj". Pri sia lando, Drissa Flayoro Diakite aldonas "La lingvo estas vera evoluiga ilo kaj multaj homoj ligas la nunan evoluadon de Malio kun malalta uzo de naciaj lingvoj en edukaj sistemoj. La neuzo de naciaj lingvoj bremsas la komprenon en ĉiuj kampoj". Jes, prave, "Neniu lando povas vere disvolviĝi sen la propraj naciaj lingvoj" asertas Bernard Gnan-cadja de Benino. Sed ankaŭ okazas same en landoj rigardataj kiel disvolviĝintaj, kiel Sudafriko, pri kiu Byelongo Elisée Isheloke priskribas ĉi tiel "La problemo estas, ke la regantoj promociis diskriminacion kontraŭ aliaj lingvaj grupoj, ĉefe tiuj de nigruloj kaj aliaj indiĝenaj popoloj"; rezulte la lando teorie egaligas ĉiujn lingvojn, praktike tute ne, ĉar ĉefe la angla, kaj poste la afrikansa, restas kiel la lingvo de la sukceso, dum la aliaj estas por fiaskuloj.

Vi ĵus legis kelkajn el la asertoj kaj priskriboj de kvin afrikaj esperantistoj, kiuj partoprenas en la projekto "Afriko en mondo de lingvo", apogata de la Universidad de Sevilla dum la kurso 2018/2019. Temas pri projekto kumpensita inter pluraj homoj. Unuflanke tiuj menciitaj esperantistoj. Aliflanke, kvin profesoroj de tiu universitato: Christoph Ehlers, Juan Pablo Mora kaj Victoria Camacho, de filologio; Susana Moreno, de antropologio; kaj Vicente Manzano-Arrondo, de psikologio. Ĉi tiu lasta estas la esperantisto kiu respondecas kaj ligas ambaŭ flankojn el la projekto.

Vi povas legi pli ĉe la oficiala retpaĝo <http://institucional.us.es/marco/indexso.htm>, kie vi trovos videojn specife registritaj de niaj afrikaj kunlaborantoj, kelkajn priskribojn pri la projekto, kaj tempman version de dulingva libreto, kies nuna enhavo konsistas el kvin ĉapitroj, laŭ la kvin landoj surface priskribitaj.

La historio de Afriko, almenaŭ dum la lastaj kvar jarcentoj, povas esti komprenita kiel rezulto de konkreta ludo: okcidentaj landoj kverelas inter ili, sed estas afrikanoj kiuj mortas. Sub preskaŭ ĉiu grava problemo en la kontinento, kiu produktas malriĉecon, maljustecon, mortantojn, damaĝon de la medio, kvereladon inter popoloj, amasajn migradojn ktp, oni facile trovas unu, du, tri riĉajn fremdajn landojn kiuj klopodas subteni siajn historiajn avantaĝojn en la loko, aŭ gajni ilin forprenante tiajn valoraĵojn el la kontrolo de alia fremda riĉa lando. Pli precize, oni anstataŭigu *lando per potenĉhava internacia firmao* kaj pli bone komprenos la realon

La lingvo estas tute bezonata ilo por venki kaj subteni la venkon. Francio kaj Britio, ekzemple, sinsekve atentis siajn ekskoloniojn por ke ili daŭre subtenu la francan aŭ la anglan kiel ĉefan lingvon. La koloniaj lingvoj ne nur regas la edukadan sistemon, kaj la ĉefajn amaskomunikilojn, sed plurfoje estas la plej bona elekto por komunikado kun la administrado, kaj ĉie estas rigardata kiel la sukceso, kiun oni ne povas forlasi se deziras iun ajn gravaĵon en la vivo.



Hispanio, Francio, Portugalio, Britio, Germanio, Belgio, Usono... klopodis elstarigi siajn lingvojn en la tiamaj ekkolonioj. Post la unua mondmilito, Germanio falis kaj la germana estis anstataŭita per la franca aŭ la angla. Hispanio kaj Portugalio perdis ĉefrolulecon, kaj Francio kaj Britio prenis sian vicon. Poste alvenis Usono ankaŭ per la angla. Nuntempe ŝajnas esti la vico de Ĉinio, tiel ke multaj afrikanoj lernas la ĉinan, pluraj el ili danke al specifaj stipendioj. Sed ĉiam estas la sama afero: "mi estas potenĉava lando, kiu elektis vian regionon por atingi ekonomian profiton. Mi ne deziras elspezi tempon, energion, monon... ĉiam por elteni tian kontrolon sur vi... Do, mi semas. La semo havas kelkajn nomojn. Jen: strukturo de la lando, leĝaro, interakordoj internacie validaj, armeo... kaj ĉefe *lingvo*. Vi lernos mian lingvon; vi subtenos mian lingvon; vi sentos, ke mia lingvo superas la viajn; kiam vi rigardos homon kiu havas mian lingvon kiel gepatran, vi sentos lin aŭ ŝin supera homo; vi sentos vin nenio, krom ke se vi regos mian lingvon; vi akceptos pensi la mondon laŭ mia lingvo, deziri la kulturon kiun alportas mia lingvo, kanti miajn kantojn, spekti miajn filmojn, koni mian historion, deziri loĝi en mia lando... Kaj kiam mi atingos tion, vi estos por ĉiam sur miaj manoj"

Bernard, Joel, Drissa, Elisée kaj Adjévi estas afrikanoj. Ili bonege konas siajn landojn. Ne nur tio. Ili ankaŭ scias legi la fonon de la ĉiutageco. Ili estas elstaraj esperantistoj, kiuj ne nur regis la internacian lingvon, sed ankaŭ prave kaj lerte prenas ĝin kiel ilon por pli bone defendi siajn kulturajojn. Ili estas pacaj saĝaj luktantoj por la justeco, ĉikaze per lingva justeco. Danke al ili, pluraj homoj nun havas la ŝancon pli bone koni Afrikon, ne ekde la vidpunkto de okcidenta lernolibro, sed ekde la ĉiutaga realo de rimarkemaj landanoj.

Ni planas iel daŭrigi la projekton, nome relegi la libron kaj korekti erarojn, plibonigi la videojn, aldoni pli da landoj, disvastigi la materialojn... Kiel normalaj esperantistoj, ni multe laboras per malmulte da rimedoj, ĉefe koro kaj scio kaj malsato de justeco. Per tiaj eroj, ni invitas vin miksiĝi. Certe vi, kiu ĉi tion legas, ankaŭ estas sama esperantisto, kiu mirakle atingas pli da horoj ol tiuj, kiujn kalkulas la horloĝo. Sed vi eble lerte atingos iomete pli. Se ne, ne maltrankviliĝu. Ni scias, ke vi jam multe laboras.

Dankon al niaj afrikaj samideanoj, kiuj restas en la sama situacio, ĉiutage

Viko

MARCIAL VILLAMOR VARELA (1899-1937), GALEGA ANARKIISTO (Kaj esperantisto).



La 28-an de septembro de 1937 estis murdita Marcial Villamor Varela. Jen delikto kiu estis neniam enketita, kaŝita ekde la momento mem kiam ĝi estis malkovrita, kamuflata sub la raporto de morto pro cerba sanglo-elfluo.

Jen mensogo kiun lia familio devis akcepti por eviti novajn reprezaliojn, kaj kiu estis parto de la strategio de la nova diktatora reĝimo, insistanta, fakte, neadi la ekzistadon de la agoj, tiel de la vivo kiel de la morto de miloj da homoj.

Marcial Villamor naskiĝis en Vilouriz (Toques; prononcu: Tokes) en 1899, kvankam tre junaĝe li transloĝiĝis al Santiago de Compostela, kie li rezidis kaj disvolvis sian laboron kiel fajnlignaĵisto kaj sian sindikatan agadon. Li estis, klare, filo de sia tempo, kaj frato de la ĝistiamaj plej bona generacio de hispanoj, al kiu la aŭdaco prirevi liberecon kostis la grandan doloron suferi perfortan jugon.

Junaĝe li ekiris kiel sendita rekruto al Afriko, kie la ricevo surmane de pamfleto kontraŭ la hispana armea ĉeesto en la kolonio ekigis sian deziron cele koni kaj lerni. Hontinte pro sia stato de preskaŭ analfabeto, ekde tiu momento li iĝis fervora memlernanto, frekventulo ĉe Kompostelaj librovendejoj, ĝis kiam li kompletigis unu el la plej bonajn personajn bibliotekojn de la urbo, kiu atingis renomon inter la lokaj intelektularoj kaj burĝaro.

Lia pasio pri legado donis al li la eblecon konatiĝi kun Ortega y Gasset. Okaze de vizito de tiu ĉi al Kompostelo, Arturo Cuadrado Moure, posedanto de la librovendejo Niké - kie klientoj pagis la prezon kiun ili konsideris taŭga por la libroj - kaj membro de la komisiono kiu prezentis la Statuton de Aŭtonomeco de la jaro 1936 en la Parlamento, rakontis al filozofo tion, ke unu sia kliento, “la renoma anarkiisto Marcial Villamor, pagis dek cendojn por libro lia... kaj je la sekvanta tago li reiris pase tien pagi aliajn dek cendojn pro tio ke ĝi entuziasmigis lin. Kiam mi rakontis tion al Ortega, tiu ĉi volis konatiĝi kun li, kaj la granda intelektulo iris en la hejmon de la lignaĵisto, kiu estis pafekzekutata en 1936”.



La ebleco de persona plenumiĝo per kulturo kaj studado estos unu el siaj kredemoj pli profundaj kaj unu el la principoj de lia publika agado. Tiel, li estis unu el la iniciatintoj kaj elstara membro de la Kompostela Liberecana Ateneo, kiu havis ĝian adreson, komunikocelo, en lia propra privata

domicilo, en la numero 18 de la strato Olvido.

Jam antaŭ la proklamado de la Respubliko, Marcial Villamor estis membro de la Regiona Galega Konfederacio (CRG) de CNT (hispana anarkiisma sindikato) reprezentante la “Sindikaton de Lignaĵistoj kaj similaj”, de Santiago ĉe la regiona tutasembleo okazigita en Korunjo (Coruña) en 1930. CRG, kies karakterizaĵo estis iom modera kondutonormo, kunlaboris, dum la lastaj monatoj de 1930 kaj la komencaj de 1931, kun la respublikemaj movadoj ĉe la primunicipa elektokampanjo kiu finiĝis je la starigado de la Respubliko la 14-an de aprilo.

La iompostioma radikaliĝo de la sindikato, ŝuldita al la pliiĝo de la influo, ĉe la estraro, far elementoj kiuj devenis el FAI (Ibera Anarkiisma Federacio) kausis tion, ke Villamor Varela, kiu apartenis al la modera flanko de tiuj nomitaj “trentistoj” (moderuloj) - kvankam li ankaŭ aktivis en FAI dum la unua jar-duo de la 2-a Hispana Respubliko - iom post iom distanciĝis el la tezoj de CNT, kvankam li restis en la laborista lukto. Tiu distanciĝo estis signifa ekde 1933, la jaro kiam demisiis la estraro ĉefdirektita de José Villaverde, kaj kiam fiaskis la insurekcia provo de ĝenerala striko deklarita en decembro post la elektada venko de la dekstrularo.

En februaro de 1934 okazis du kontraŭaj faktoj kiuj samtempe evidentigis tiun distanciĝon. Samtempe kiam li partopenis kiel delegito de CRG ĉe la “Nacia Regionaj Tutasembleo” de CNT, li vizitis Angel Pestaña-n, fondinto de la Sindikatisma Partio, kaj homo inklina al prielekta partoprenado kaj al la kunlaboro kun maldekstraj partioj. Tiel, dum la tiujara somero, ĉirkaŭ Villamor kreigi la Santiaga reprezento de la Sindikatisma Partio, la plej densa de la partio en Galegio, kiu integrigis multajn kompostelajn sindikatajn kadrojn- precipe ekde la okazintaĵoj de oktobro- malkontentaj pro la sinteno de la anarkiisma sindikato.

La 10-an de oktobro li estis arestata je la unuaj horoj de la frumateno, kiam li enmane havis foliojn de propagando favore al amnestio de enprizonigitaj maldekstraj politikistoj, kaj ene de kiuj oni kritikis la liberigadon de la puĉismaj generaloj kiuj ribelis armile kontraŭ la Respubliko. Li estis juĝe procesigita de armea tribunalo pro la delikto de “ekscitado al armea ribelo provograde” kaj kondamnita al ses jaroj de prizono, kiujn li tute plenumis

En la raporto kiun la armea Juĝejo petis al la Ĝenerala Direkcio de Sekureco, la Kompostela Komisararo sciigis tion ke Villamor estis rigardata en la urbo “kiel unu el la plej gravaj gvidantoj de la laboristaj amasoj; li estis la fondinto de la Liberecana Ateneo, kiu nuntempe agadas kaŝe, kaj li ĉiam aktivis en ĉiuj socialaj movadoj deklaritaj en ĉi tiu urbo (...). Pri lia ebla partoprenado en la revoluciemaj agoj de aŭtuno de 1934, la raporto plu sciigas tion ke ”kvankam ne ekzistas nerefutebla pruvo pri lia partopreno, estas supozeble ki li estas unu el ties ribelestroj, pro tio ke antaŭ tiuj tagoj li elstaris kiel vera gvidanto, kaj inter la ĉi-urbaj laboristoj oni konsideras lin kiel unu el la ĉefajn organizantojn de la laboristaj amasoj”.

Krom la taksado kiel akuzopruvo kiun tiu raporto meritas de ĉiu, estas evidente ke ĉirkaŭ 1934 Marcial Villamor Varela estis elstara homo ĉe la Kompostela laboristomovado, kun publika influo kiu aparte reliefigis lin kaj kiu, poste, determinis sian tragikan finon.

Dum la tempo kiun li pasigis en la karcero li komencis kunlabori kun la larĝaspektra semajna gazeto “SER”, sub la gvidado de siaj amikoj Suárez Picallo kaj Arturo Cuadrado. Post kiam li plenumis sian punon, je la fino de 1935, li partoprenis en la preparado de la elektada procezo de 1936. Al tiu elektado, la Sindikatisma Partio alvenis integrita en la “Popola Fronto”. En la monato julio li partoprenis mitingon favore al Statuto de Aŭtonomeco, okazigita en Pontevedro.

Post la armea puĉo de la 17-an de julio de 1936, kiu fariĝis insurekcio la 18-an, Marcial Villamor Varela estis vokita partopreni la Defendo-Komitaton kiu la puĉon alfrontis en la urbo. Alia plia ekzemplo pri sia supreniro ĉe la Kompostela laborista movado, kaj alia kialo por tiuj kiuj decidis ekzekuti lin.

En la kunveno kiu okazis en la Placo de Obradoiro kaj en la kunsidoj de la Defendo-Komitato oni diskutis pri kiu strategio estas sekvenda fronte al la puĉo, kaj oni komparis la diversajn ideologiajn sintenojn. Laŭ la historiisto Luis Lamela, nur la interveno de Villamor, de Fernando Barcia (socialisto, prezidanto de la Komitato) kaj de Germán Fernández, malhelpis la sturmon al la domo de la entreprenisto Olimpio Pérez (estis cirkonstanco ke la bopatro de Marcial Villamor estis la ŝoforo de la familio Pérez) kaj la bruligon de kelkaj lokaj preĝejoj.

Ĉi-riilate, kaj kiel montriĝas de atestoj de milit-konsiliĝoj, kaj per parola transdonado, ŝajnas esti pruvita tion, ke Villamor ankaŭ malhelpis tion, ke la Kompostela katedralo estu damaĝita. Laŭ-dirite de, inter aliaj, la jam forpasinta membro de CNT kaj loka entreprenisto Manuel Ceruelo, Villamor konis la projekton de kelkaj flamiĝantaj frakcioj el la maldekstremaj membraroj kiuj celis dinamiti la katedralon. Tiel, en la nokto de la 18-a aŭ la 19-a de julio, li formis protekto-patrolon kiun li partoprenis, kune kun Ceruelo, kiu alfrontis frape tiujn kiuj intencis damaĝi la monumenton. Certe, la defendantoj venkis kaj la konstruaĵo eltiriĝis sendamaĝe el la certa risko de detruo kiun ĝi alfrontis, kaj kiu frapis aliajn hispanajn templojn dum la Enlanda Milito.

Santiago restis lojala al la Respubliko eĉ la 20-an de julio, kiam grupo da volontuloj apogitaj de ministroj de Lousame direktiĝis al Korunjo cele defendi la Registaran Delegejon kontraŭ la ribelantaj militistoj.

Profitante la foreston de ia kontraŭstaro, la armea komandanto de la loko kaj de la artileria taĉmento, José Bermúdez de Castro, akiris la kontrolon de la urbo. Je la 12-a nokte la trupoj prenis la ŝlosilajn poziciojn kaj la Kompostelajn stratojn. La urbestro Casal estas devigita cedi la komandon al Bermúdez de Castro. Laŭ Fernández del Riego, je la momento de la kapitulaco oni promesis respekti la personajn vivojn, promeso kiu, kiel la historio rakontas al ni, ne estis plenumita.

En tiu sama nokto, armita aro da falangistoj sturmis la domon de Marcial Villamor, kaj tiu estas devigita fuĝi, saltante la murojn de la hortoj kiuj konsistigas la malantaŭan parton de la dombloko, kaj kiu hodiaŭe estas parto de la Parko de Belvis. Li sukcese eskapis inter la pafado de la ribeluloj kaj rifuĝis ĉe la apuda strato de la Pexego, en la domo de amiko kaj laborista kompano, dum kelkaj tagoj.

Dum tiu tempo atakoj kaj traserĉadoj al la domo estis senĉesaj, same kiel la suferoj de lia familio.

Vizitoj je iu ajn horo tage kaj nokte, la detruado de meblaro, la disrabo de lia aprezata biblioteko, tute renversita kaj forprirabita, disdonita inter la atakantoj kaj parte bruligita en la strato mem, ĝis tio ke eĉ ne unu libro restis en la posedo de la familio, la angoro de la familio pro tio ke ili ne sciis en kiu stato Marcial estis, insultoj, ĉikanajoj, agresoj, kaj eĉ la forrabado de la bopatro de Marcial, Martín Castiñeiras, kies vivo estis savata nur pro la interveno de lia mastro, Olimpio Pérez, estis kelkaj el la suferajoj de tiuj tagoj.

La familio de Marcial, kiu rezidis en la familia domo de la strato Olvido, 18, konsistis el lia bopatro, lia edzino kaj 5 gefiloj, la plej aĝa de 12 jaroj kaj la plej juna de nur kelkaj monatoj.

Marcial sukcesis eskapi disde siaj persekutantoj

kaj, post malgaja adiaŭo, kie li nur transmetis sian rigardon al sia familio en San Lázaro, senvorte, li kaŝiĝis en la domo de siaj kuzoj en sia denaska vilaĝeto Vilouriz (Toques). Tie li pasigis kelkajn monatojn dum kiuj la sieĝo ĉirkaŭpremiĝis kaj la serĉadoj reokazis sinsekve. Same kiel multaj aliaj tiuepokaj rifuĝintoj, li sukcesis resti kaŝita danke nur al la fortuna kaj al la klopodoj de tiuj kiuj gaste protektis lin, estante la ĉefrolulo en diversaj aventuroj kiuj, se ne estus pro la tiutempaj cirkonstancoj, estus ja samtempe nekredablaj kaj dramegaj.

HOMENAJE A MARCIAL VILLAMOR VARELA

TOQUES Sábado 25 SEPTIEMBRE



**GALICIA NO
DIARIO CNT
(1932-1934)**
RECOPIACIÓN DE NOVAS
REFERIDAS A GALICIA
APARECIDAS NO DIARIO CNT
ENTRE OS ANOS 1932 E 1934



La premo komprenigis al li tion ke li ree multe riskis, kaj li kaj tiuj kiuj protektas lin, kaj li decidis daŭrigi sian fuĝon al la plej proksima sekura teritorio, t.e. Asturio, ankoraŭ lojala al la Respubliko. Tiel, en septembro de 1937, kun pruntedonitaj dokumentoj, li forlasis sian kaŝejon. Li estis arestita survoje, en Baralla. Komence, oni liberigis lin, ĉar lia alibio sukcesis. Tamen, elirante la arestejon, li renkontiĝis ĉe la elirejo kun ribelulo kiu devenis el Santiago kaj kiu tiuj rekonis lin.

Li estis tuj arestita, kaj oni ordonis sian translokon al la galega ĉefurbo. Dum la vojaĝo, en la municipo Guntín, li estas mortigita per surkapo pafo.

Lia morto estis unu plia el la multaj kiujn okazigis la sistema subpremo farita de la ribeluloj kontraŭ tiuj kiuj dum la respublika jarkvino praktikis sian socialan kaj politikan aktivadojn en la kontraŭa tendaro; subpremo kiu singigis Hispanion en malprogreson dum jardekoj,

rilate al Eŭropo. Ĝuste, pro tio ke la viktimoj estis parto de la ĝistiamaj plej brila, plej edukita kaj, kio estas la plej grava afero, plej engaĝiĝinta al la estonteco de la lando.

Villamor estis unu el la unuaj celoj de la Santiagaj faŝistoj pro sia elstara laborista aktivado kaj pro sia sindikata agado, kiu naskis kontraŭ li la malamon de tiuj kiuj kontraŭstaris la progreson de la vivstatoj de la laboristoj. Lia postuloj inkluzivis aferojn kiuj hodiaŭe ŝajnas al ni tute akceptindaj, kiel la hora redukto de ekscesaj labortagoj, la dignigado de la laboraj kondiĉoj, la ĉiusemajna ripozo kaj la aliro de la laboristoj al la kulturo per ties disvastigo kaj la stimulo de la edukado.

Lia afabla kaj trankvila karaktero kaj lia bonkoreco kondukis lin al malakcepti perfor-ton kiu tuŝis grandan parton de la tiuepoka galega kaj hispana socioj. Ĉiam fidela al siaj ideoj, lia modereco metis lin kelkfoje kontraŭ liaj kompanoj de aktivado, sed tio, tamen, ne utilis al li eviti la malamon de tiuj kiuj mortigis lin. Lia kultura edukado portis lin al socia kaj teknika scio kiu ne estis propra de lia humila deveno. Tiel, li estis scianto de multaj el la tiutempaj teknikaj progresajoj kaj eĉ de kelkaj nuntempaj, pri kiu li ŝatis paroli, kaj li aliĝis al preskaŭ nekonataj movadoj kiel vegetarismo, ĝis kiam li estis venkita de la nutraj antaŭjuĝoj de sia edzino. Malgraŭ lia sindikata kaj laborista aktivado, li praktikis rafinitan toleremon al la kredoj de aliuloj, komencante ekde la religiemo de sia familio kaj la konservativa penso de sia bopatro, dungito de la bankieroj Pérez.

Juan García del Río

EL “MIA LIRIKO KAJ LA MUZIKO”

Kadre de la pasintmaja Triopa Kongreso en Malago, mi havis la plezuron kaj la honoron prezenti mian unupersonan spektaklon *Mia liriko kaj la muziko*, surbaze de diversstilaj kantoj kaj pluraj poemoj el mia tria poemaro, *El miaj sonoraj soloj*, pasintjare aperinta en Parizo, publikigita de SAT – Eldona Fako Kooperativa. Mi kaptas ĉi okazon por elkore danki la ĉeestintojn pro ilia kor-karese varma reago kaj ĉiujn geamikojn, kiuj ĝis nun mesaĝis al mi sian emocian ŝaton al tiu prezentado. Inter la plej laŭdataj el la de mi deklamitaj poemoj, troviĝas mia amata *Mia nepeto Víctor*. Jen ĝi ĉi-sube por la legantoj de *Boletín*:

MIA NEPETO VÍCTOR

La 31an de decembro 2017, en lia 4-jariĝo

Plej aminda buŝeto anhela kiel sonĝo,
eksunis vi ĝojdona, malkvieta,
kiam jam la ĉielon miavivan
prilumis la komenco de la lasta lun-arko.
Kaj mia mondo re sin inaŭguris
ĉe via plor’ unua aŭ vivkrio.

(Ho, vivkrioj ŝprucantaj
post ol du buŝoj aŭ pasioj sinkas
unu al la alia
gravitforte, neprege, plezurpleje!)

Lum-vatita korpeto,
mi ĉiam vin imagis
duone tero kaj duone kisoj.
Tute prave!
Ili – feliĉe! – tempopase naskis
kultivindajn ribelon kaj teneron.

Korpeto el hidrargo en konstanta moviĝo
neebla por regato de la lasta lun-arko.
Neebla ĉe duopaj longaj kvarpiedumoj
sekvataj de subitaj stariĝoj, kuroj, saltoj...

Avĉjaj ostoj preferas la fabelojn...

Ŝvita korpeto sur krurparo sidas
kun la okuloj larĝe malfermitaj
kaj la penso fluganta en mirlandojn,
kiujn la voĉo de la avo pentras.

Alabastraj manetoj karesas miajn vangojn,
ekfrapas klavojn de ludil-piano,
pinĉas kordojn de blua ukulelo
– plezure, ritme, ofte –,
aplaŭdas en partero,

entuziasme,
en la momento ĝusta,
kune kun la publiko,
post kiam mi oper-arion kantas...

Scintilaj okuletoj kaj okuloj!

Víctor ŝatas fabelojn kaj muzikon!

Ho, nepo miakora, enkarniĝinta songo
ema al belo, ribelo kaj tenero,
ema do iĝi ido de libero!



Miguel Fernández



“Blua horizonto”

KD 10 titoloj + libreto kaj bita albumo - 42:12 mm

Blua horizonto estas la unua albumo de **Kjara** (Chiara Raggi) en la panoramo de la esperanto-muziko kaj kulturo.

Ĉi tiuj estas dek kantoj, en kiuj Kjara miksas la kantaŭtoran stilon kun jazo kaj mondkuziko. Registrita inter Italio kaj Novjorko, ĉi tiu albumo profitas el la kunlaboro de internacie famaj muzikistoj, de malproksimaj muzikaj geografiaj mondoj, de Brazilo ĝis Novjorko, tra la itala kantverkista tradicio.

Blua horizonto estas albumo verkita

kun piedoj en la akvo, proksime de la maro, grava elemento en la **Kjara**-poetiko kune kun la temo de vojaĝado, serĉante belecon ene kaj ekstere de ni.

Ĉi tiu albumo estas vojaĝo al homa ekzisto, kaj rakontas travivaĵojn kaj sentojn kiuj loĝas en la koro de la homo.

Ĉiuj kantoj estis tradukitaj/adaptitaj de **Renato Corsetti** kaj **Gianfranco Molle**.

La oficiala prezento de la KD okazis dum koncerto en IJF en Italio (Rimini) la 20an de aprilo 2019.

Por aŭskulti fragmentojn aŭ mendi la KoDiskon elŭti muzikojn aŭ la bitan albumon laŭ mp3 aŭ aliajn formatojn ĉe la muzika platformo de VINILKOSMO:

<https://www.vinilkosmo.mp3.com/eo/kanzono.tradicia-progresiva/kjara//1-blua-horizonto.html>

Por vidi rezuman biografion de la artisto klaku ĉe:

<https://www.vinilkosmo.mp3.com/eo/kanzono.tradicia-progresiva/kjara.html>

Por aŭskulti la albumon laŭ justa elsendfluo ĉe Muzik-Diverseco:

<https://music.divercities.eu/albums/402807>

Por aŭskulti la esperantan albumon elsendflue ni rekomendas aboni al la ABONKLUBO por aliri la justan elsendfluejon Muzik-Diverseco:

<https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/vinilkosmo-abonklubo/abonoj-abonklubo.html>

Disvastigenda informo...!!!

VINILKOSMO *Esperanto-Muzik-Prod.*, FR-32450, Francio, contact@vinilkosmo-mp3.com

